

Stefan MacGill,  
Prezidanto de ILEI



Koran bonvenon al nia 44a Konferenco!

Post Ameriko, kaj antaŭ Azio, denove eŭropa ĉefurbo akceptas nin! Kun solida nombro de partoprenantoj el vasta gamo da landoj, ni atendas stimulan, intensan kaj agrablan semajnon. Kiel ĉiam, ni spertos fakan, laboran kaj distran fadenojn en la programo.

La komitato de ILEI laboros kiel neniam antaŭe por trabori templan tagordon. Ŝlosilaj eroj estos pritakso de la raportoj pri 2010, traktado de proponoj modifi la Statuton kaj Internan Regularon kaj diskutoj pri la estonta agado de la ligo, nelaste, kiel akiri novajn laborfortojn. La estonta agado ricevos atenton ankaŭ en aliaj konferencaj programeroj, kie viaj ideoj kaj help-ofertoj bonvenos. Ni memorigas al vi, ke la Komitat-kunsidoj estas publikaj.

La krona pinto de nia konferenco estos la simpozio, kies preparoj kaj labordokumentoj aŭguras tre sukcesan kaj valoran eventon. La prelegoj reliefigos gravajn ekzemplojn de lingva maljusteco en sciencaj kaj edukaj rondoj, des pli tio gravas ĉar tio ne nur okazadas, sed intensiĝas. Nia konferenco okazas en landaro kie tiu diskriminacio kontraŭ la propraj naciaj lingvoj estas aparte okulfrapa. Jen temaro tiom esenca al la perspektivoj por nia Ligo, ke ni proponas aldoni ĝin al nia statuta celaro. Salutinde, ke ILEI sukcesis iniciati ĉi tiun kunvenon, en kunlaboro kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Monda Lingvo-Problemo (CED) kaj la Universitato de Kopenhago.

Nome de vi ĉiuj, ni kore dankas al la membroj de la Loka Konferenca Komitato kaj la tuta organiza teamo, kiuj laboregis tra la monatoj por pretigi nian kunvenon.

Bondezirojn por fruktodona kaj neforgesebla semajno kune!